

Esperanto kaj UN

Informilo de la oficejo de UEA por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 76, majo-junio 2025



Universala Esperanto-Asocio

Internacia Virina Tago: La Prezidento de Burundo honoris esperantistinojn Anny Joanice Nizigiyimana

Okaze de la Internacia Virina Tago 2025 de Unuiĝintaj Nacioj, 26-jaraĝa UEA-membro kaj aktivulino Anny Joanice Nizigiyimana, el Burundo, ricevis specialan honorigan premion de la Prezidento de Burundo s-ro Evariste Ndayishimiye. Kune kun Mana Brinson (el Demokrata Respubliko de Kongo) ŝi reprezentis UEA en la Civilsocio Konferenco de UN en Najrobo, Kenjo, en majo 2024, kaj ankaŭ ludis aktivan rolon en la Universala Kongreso de Esperanto en Aruŝo, Tanzanio, tri monatojn poste. Anny daŭre rolas kiel UEA-representanto en postkonferenca agado fontanta el la Civilsocio Konferenco.



Kiel vicprezidanto de la Asocio de Komercaj Virinoj de Burundo (AFAB) kaj direktoro kaj fondinto de la firmao Innovation Plus Plus, ŝi fokusigas sian laboron je helpado al aliaj virinoj venki la defiojn kiujn ili frontas en la mondo de komerco.

En sia rolo kiel gvidantino en antaŭenigo de virina entreprenemo, ŝi instigis diskutadon en la Universala Kongreso en 2024 pri la rolo de afrikaj virinoj kaj pri virinaj rajtoj. Ŝi rolas kiel reprezentanto de Burundo en EVAA, Esperantista Virina Afrika Agado, kaj, kunlige kun la kongreso en Aruŝo, ŝi ankaŭ partoprenis la Duan Afrikan Kongreson de Virinoj (2-a AKVo) en Aruŝo, ĵus antaŭ la 109-a UK, en kiu Esperanto estis la laborlingvo.

En intervjuo en la revuo *Akeza*, Anny rimarkigis, ke la ĉefa problemo kiun frontas virinaj entreprenistoj en Burundo estas aliro al financado: manke de garantia kapitalo, ili malfacile povas akiri bankajn pruntojn; kaj ankaŭ ekzistas sociaj antaŭjuĝoj kiuj senkuraĝigas virinojn kiuj deziras konstrui entreprenojn.

La plej nova projekto de Anny Joanice, kune kun koleginino Najma Hassan, estas plano por instigi gimnaziajn lernantojn, precipe junulinojn, ke ili fariĝu instruistoj. Sub aŭspicio de la Buĝumbura Esperanto-Klubo, la trimonata projekto trejnas tridek estontajn instruistojn de elementaj lernejoj. La programo, kiu inkluzivos trejnadon pri Esperanto-instruado, estas subtenata de la Afrika Komisiono de UEA.

En decembro 2023, en Rumonge, Burundo, Anny Joanice partoprenis kvintagan seminarion de UEA pri “Teknologio kiel potenca ilo por signife plibonigi edukadon en Burundo” kiu arigis 20 junajn esperantistojn el ses provincoj de la lando – plia projekto de UEA en Afriko.

Universala Esperanto-Asocio funebris la forpason de la Papo Francisko

En mesaĝo al la publiko, UEA funebris la forpason de “granda internaciisto kaj humanisto Lia Sankta Moŝto Papo Francisko ... la unua papo el Ameriko, naskiĝinta en Argentino.” La Asocio atentigis, ke “Papo Francisko estis ne nur gvidanto por la katolika eklezio, sed ankaŭ tutmonda voĉo por paco, justeco kaj ekologia konscio – valoroj karaj al internaciistoj kaj tute aparte al esperantistoj, parolantoj de la Internacia Lingvo Esperanto.”

“Papo Francisko senlace defendis la dignon kaj akceptadon de ĉiuj homoj – precipe malriĉuloj, enmigrintoj, indiĝenoj kaj forgesitoj – kaj kuraĝigis dialogon trans ĉiuj limoj de diverseco, kulturo, religio kaj ideologio.”

UEA, mem neŭtrala rilate al religiaj aferoj, direktis siajn specialajn kondolencojn “al la katolika komunumo kaj al ĉiuj homoj de bona volo, aparte al la membroj de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) kaj al la Esperanto-teamo de la Radio Vatikana.” La mesaĝo notis, ke Radio Vatikana de jardekoj elsendas en la neŭtrala internacia lingvo Esperanto. “Pluraj el la tekstoj de Papo Francisko aperis en Esperanto, inter ili *Laudato Si*, *Laudato Deum* kaj *Ne timu, estas mi*, kolekto de verkoj pri migrantoj kaj rifuĝintoj.”

La mesaĝo notis, ke “kiel poligloto kaj internaciisto” Papo Francisko “parolis ok lingvojn kaj komprenis la valoron de lingva kaj kultura diverseco.” Aldone, la mesaĝo notis, ke “post sia vizito al Meksiko, en februaro 2016, Papo Francisko estis demandita de ĵurnalisto ĉu li sonĝas en la itala aŭ en la hispana, al kio li respondis: ‘Mi dirus, ke mi sonĝas en Esperanto’. La respondo estis nur simbola: laŭ nia scio, Papo Francisko ne parolis la Internacian Lingvon Esperanto, sed li ja subtenis ĝiajn idealojn.”

“Kiel organizaĵo dediĉita al interkultura dialogo en daŭripova evoluigo, UEA alte taksas liajn kontribuojn al pli paca kaj justa mondo kie internacia solidareco estu kerna valoro. Vera mondcivitano, per sia vivo kaj verko Papo Francisko lasas nemezureblan heredaĵon por la tuta homaro. Al kredantoj aŭ al nekredantoj: egale li donis al ĉiuj esperon. Kaj espero estis la kerno de la mesaĝo de alia granda humanisto, Ludoviko Zamenhof, kreinto de la lingvo Esperanto, kiu enskribis la Esperon eĉ en la nomon de sia lingvo Esperanto.”

Lingvaj rajtoj – en kaj preter Unuiĝintaj Nacioj

Dum la Studogrupo pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj pretigas sin por sia ĉiujara simpozio la 13-an de junio, demandoj pri lingvaj rajtoj, nacie kaj internacie, daŭre leviĝas. La Komitato de Neregistaraj Organizaĵoj pri Lingvoj, kies bazo estas en Novjorko, rekontiĝis la 28-an de februaro por pridiskuti indiĝenajn lingvajn rajtojn; kaj la rajto je edukado en la gepatra lingvo estis la temo de rimarkoj de prof. Francis M. Hult, prezidanto de la Komitato, en akcepto organizita de la UN-Misio de Bangladeŝo por festi la Tagon de la Gepatra Lingvo la 21-an de februaro.



La lastatempa deklaro de la usona prezidento, kiu nomis la anglan kiel la nacian lingvon de Usono, certe kirlos debatadon en la komuna usona-kanada Esperanto-kongreso en Toronto (11-14 julio) kaj nur akriĝis maltrankvilon pri lingvaj demandoj en internaciaj medioj.

“Ĉu Lingvaj Homaj Rajtoj Ekzistas?” demandis reta seminario organizita de d-ro Michele Gazzola, de Ulstera Universitato, la 10-an de aprilo. La demandon eĥis la titolo de speciala numero de la revuo *Language Problems and Language Planning (LPLP)*. Tiu revuo, elstara sur la kampo de socilingvistiko kaj lingvopolitiko, estis fondita de Esperanto-parolantaj lingvaj fakuloj antaŭ duonjarcento por ekzameni politikajn kaj sociajn rilatojn inter lingvoj.